

4(188)
2022

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo **ESPERANTO**

Bultenon redaktas:
Adreso por korespon

ĉiuj anoj de Krakova Societo **ESPERANTO**
str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW


Josif Brodski

Krzysztof Kamil Baczyński

Fuĝo al Egipto

..jen sendito aperis, de kie – ne sciante.

En dezerto farita por miraklo beata;
kaj estis kiel iam, tranokto dum sieĝo,
brulis fajro. En groto surŝutita per neĝo –
ne sentante ankoraŭ sian tutmondan rolon
kviete dormis bebo en ora aŭreolo.
Liaj haroj alprenis lumecon pro kumulo
por brili ne nur nune, en land' de nigr-haruloj,
sed kiel vera stelo per reala bril-flamo
ĝis kiam estos l' tero: en ĉiu lok', ĉiame.



Poemo pri Kristo Infana. Lulkanto

Kadr' ĉiela fluas pluve,
ekdormu mia Etulo.
La tero kiel hamako
Vin, Etul', al dormo lulos.

Mia reĝo, orf-etulo,
mia etulo – titano
miozot-okula.
Kian teron vi paŝos lontane,
kiaj vojoj envolvos vin flaŭre?
Antaŭ dormo donu al mi pacon,
mia eta, restu kun mi daŭre.

Eta Dio ekridetis grace,
benis l' mondon rideto infana.
Mia reĝo, orf-etulo,
mia eta Mesio
kia terura neĝblovado,
kia terura homa historio.

tradukis Lidia Ligęza

*Okaze de alproksimiĝanta Kristnasko
kaj Nova Jaro 2023 Krakova Societo
ESPERANTO bondeziras al ĉiuj anoj
kaj amikoj firman sanon, bonstaton,
prosperon, kvieton, paciencon kaj feliĉon.*

Libero

Kun la amikino ni volis reveni pertrajne de agrabla ekskurso tra nealtaj Sanktkrucaj Montoj. Envagoniĝinte ni serĉis oportunan lokon. En unu el kupeoj, sub fenestro, sidis nur unu pasaĝero – do ni instaliĝis ĝuste tie.

Antaŭ ol la trajno startis venis al nian kupeon ankoraŭ kelkaj gejunuloj, probable studentoj kun gitaro. La amikino demandis ilin, ĉu intencas ludi kaj kanti, ĉar ŝi preferus tion eviti pro la forta kapdoloro. Gitaristo tuj respondis, ke senhezite ili pretas plenumi ŝian peton, ĉar pli frue, dum la ekskurso, ili ĝissate muzikis kaj nun eĉ sentas sin iom lacaj.

Tiam pasaĝero de sub la fenestro, severmiena juna homo, per akra voĉo anoncis: "Ĉar ni vivas en libera lando, neniu rajtas malpermesi konduton, al kiu li aŭ ŝi sentas emon kaj plaĉon."

Sur subfenestra tableto etaĝigis stako da juraj lernolibroj kaj kodoj, do des pli mi intensis iome inciti la posedanton – lekcianton kaj diris: "Mi ne scias, en kiu el ĉi tiu abunda libraro vi trovis unusole ĝustan opinionon pri libero, sed pritaksu, ĉu vi tute bone sentus, kiam mi proponus al vi mian modelon. Mi tre ŝatas rigardi fajron. Imagu, ke mi starigas sur stako de viaj libroj ekbrulitan kandelon, kiu memkompreneble likas, por kontente kaj libere rigardi la flamon..."

La adepto de libero, klare ofendita, mutis jam ĝis fino de la vojaĝo.

Hejmen mi revenadis apud Jagelona Universitato, kie sur ronda skvaro kreskas Kverko de Libero. Ĝuste enorma luphundo demonstranta emon kaj plaĉon agi libere plenumadis ĉe ĝia trunko sian bezonon. Tiun bildeton mi opiniis la plej bona pintumo de niaj interesaj postekskursaj pripensoj pri libero.

Kwaidan. Rakontoj nekutimaj.

Jiu – Roku – Zakura

En distrikto Wakegori en provinco Iyo kreskas tre maljuna kaj fama ĉerizarbo nomata Jiu – roku – zakura, aŭ Ĉerizarbo de la Deksesa Tago, ĉar ĉiun jaron ĝi ekfloras deksesan tagon de la unua monato (laŭ malnova luna kalendaro) – neniam alian. La tago, kiam ĝi kovriĝas per floroj okazas do en Tempo de la Granda Malvarmo, kvankam la natura moro de la ĉerizo estas singardema atendado de printempo. Sed Jiu – roku – zakura ne floras laŭ la propra vivo, ĉar loĝas en ĝi animo de la homo.

Li estis samurajo el Iyo, kaj la arbo kreskis tiam en lia ĝardeno kaj floris dum la konvena tempo, do fine de marto aŭ komence de aprilo. Li ludis sub ĝi estante ankoraŭ infano, kaj ĉiujare, de pli ol cent jaroj, liaj gepatroj, geavoj kaj prageavoj pendigadis sur la florantaj branĉoj brilajn rubandojn el bunta papero kun laŭdaj poemoj. Li mem tre maljuniĝis, travivis ĉiujn siajn infanojn kaj nenio jam restis sur la mondo por ami krom ĉi tiu arbo. Sed jen somere en iu jaro ĝi velkis kaj mortis!

La maljuna homo ege desperis, ĝis favoraj najbaroj serĉis por li junan kaj belan ĉerizon kaj plantis ĝin en la ĝardeno esperante, ke ĉi-maniere lin konsolos. Li dankis al ili kaj imitis ĝojon, sed vere la koron havis troplenigitan per doloro, ĉar ege amis tiun arbon kaj nenio tiun perdon povis al li rekompenci.

Finfine venis al lia kapo la feliĉa penso. Li rememoris al si, kiel oni povas savi pereantan arbon, kaj estis tiam la deksesaj tago de la unua monato. Li iris sole al la ĝardeno, malalte korpkliniĝis antaŭ la amata ĉerizo kaj diris al ĝi per tiuj jen vortoj: – Bonvolu, mi vin petegas ekflori ankoraŭfoje, ĉar mi intencas por vi morti.

Li dismetis sub la arbo blankan tolon kaj diversajn kovrilojn kaj sidinte sur ili laŭ samuraja moro faris hara-kiri, kaj lia spirito eniris en la arbon, kiu en la sama horo kovriĝis per floroj.

Kaj de tiu tempo ĉiujare ĝi floras la deksesan tagon de la unua monato, dum tempo de la neĝoj.

Kaprinoj

Al Pollando revenas tuberkulozo, denove minaca. Ĉi tiun malĝojan informon komunikas gazetoj, radio, televizio. Laŭ publikiloj plifortiĝas kvanto de malsaniĝoj – kaj ja oni imagis, ke ĉi malsano estis entute bremsita en jaroj sesdekaj, en la civiliza mondo. De komenco de dudeka jarcento ĝis nun ĝi forvoradis multe da homaj estaĵoj. Riĉuloj kuracis sin en Merano, bonstatuloj en Zakopane, mizeruloj mikrobakteriis, tisis, anhelis surloke ĝis la morto. Antaŭurba plebo kredis forte en kuracan agadon de la kaprina lakto; bona, grasa, ĝi plifortigas, preventas kontraŭ anemio kaj haltigas progreson de ftizo. En Nowa Wieś kaj Łobzów kaprinoj ne mankis. Ili povis paŝti sin ĝissate sur vastaj herbejoj. Sed vere neanstataŭebla, la plej bona lakto oni opiniis tiun devenantan de grandioza kaprino el strato Czarnowiejska. Sur malantaŭoj de Krakova Parko kaŝis sin inter veproj de sambuko kaj tufoj de belkreskaj urtikoj negranda kabaneto. Sur peco de herbejo, kie kreskis belaj ŝampinioj skuis per barbo kaj grandega melkalo ĉi super-kaprino, blanka, dignoplena, donanta la plej grasan lakton, faman en la tuta ĉirkaŭaĵo, kun Łobzów inkluzive. Kiel nomiĝis ĝia posedantino, olda virino mi ne memoras, sed neniam mi for-geos ĉi beston rigardantan atenteme per bierkoloraj okuloj kun vertikala pupilio sian negrandan mondon.

Mi ne toleris kaprinan lakton, cetere mi ne malsanis, do neniu min devigis trinki. Mi vagadis al Czarnowiejska kun kolegoj nur pro scivolemo. Nun, de vojaĝo de Italio kaj Francio mi ŝategas kaprinajn fromaĝojn, bedaŭrinde, ĉe ni multekostajn.

Kaprinoj mem estis por mi ĉiam simpatiaj, inteligentaj kaj belaj. Al obstina konatino mi donacis mian grafikaĵon: knabino kaptas per la manoj ekvilibron starante sur la dorso de la belstatura kaprino. Mia frato al ĉiuj *capridae* montras klaran antipation. Kiel infano kornobatita neatendite en la dorson, li kreskinte sane ĝis dek kvin jarojn timigadis renkontitajn kaprinojn per agresiva pozo, kliniĝinta kapo kaj minaca mekado. Ili fuĝadis – kiel nimfoj antaŭ Satiruso. – Kaj vi memoras Amalteon, kaprinonutristinon de malgranda Zeŭso kaj ĝian miraklan kornon eterne plenan de ĉio, kion ekdeziris posedanto?

Mi deziras al vi tian kornon de la abundo. Por ĝi estu plena de sano, trinkaĵo, manĝaĵo, belve-tero kaj kvieto.

tradukis *ĉeestantoj de klubaj okupoj*

Lidia Ligęza

Krakovo – trezorejo de unikaj belaĵoj kaj de kulturaj pripensoj

Junie, en 2022 j. oni apertis por publiko novan Kronan Trezorejon en Vavelo. Ĝi ampleksas objektojn kolektatajn de XV jarcento kaj eblajn por rigardi preskaŭ cent jarojn.

Elstarajn ekzemplojn de la arta metio kompletigas historiaj memoraĵoj, inter kiuj distingiĝas pikanta blanka armilo, preskaŭ ne ornamita rapiro gajnita laŭ ne entute fidindaj transdonoj apud Grunwald.

Ĝenerale plaĉas rondaj orientdevenaj ŝildoj faritaj el figarbaj stangoj ĉirkaŭplektitaj per silko, kun metala mezo ofte inkrustitaj per noblaj juveloj. En Pollando oni uzadis ilin de XVI ĝis XVIII jarc.

Ne mankas ankaŭ insignoj de reĝo kaj donacoj por regantoj montrantaj dum kelkaj jarcentoj signifon de eksa Respubliko. De XIV jarc. la kronan trezoron oni apartigis de la katedrala kaj simbolojn de la reĝa reĝo kiel krono, sceptro kaj pomo oni tenis en la reĝa kastelo kaj uzadis nur okaze de la kronigaj solenaĵoj. En trezorejo troviĝis ankaŭ oraj kaj arĝentaj pokaloj, bovloj kaj teleroj, kronigaj vestoj kaj relikvujoj. Lastfoje oni utiligis tiujn regaĵoj dum kronigo de Stanislaŭo Aŭgusto jam en varsovia katedralo al Sankta Johano en la jaro 1704.

Pereo de trezorejo okazis en la j. 1795, kiam prusoj prirabis polajn reĝaĵojn, kiujn poste detruis fandante kronojn al oro kaj perloj kaj juveloj vendante. La resto de la kolekto spertis komplikigitan sorton kaj vojaĝojn precipe dum la dua mondmilito. Vavelaj trezoroj revenis al la lando en 1959 kaj

1961 j. Denove oni tiam apertis la reĝan trezorejon. Krom fama, kroniga Breĉglavo troviĝis tie glavo de Sigismundo la Olda, standardo de Sigismundo Aŭgusto kaj liaj kronigaj sandaloj. En trezorejo oni fiksas ankaŭ multajn preĝejajn kalikojn kaj kolekton de polaj kaj germanaj arĝentaĝojn, memoraĵojn post Kazimiro la Granda, ambaŭ Sigismundoj kaj Johano Sobieski, precipe splendajn donacojn post la viena venko.

Rare montrataj valoraj objektoj nune ricevis pli multe da loko kaj ĝustan manieron eksponi. Nova trezorejo pligrandiĝis trifoje de kvar ĝis dekdu ĉambregoj. Por ĝiaj bezonoj oni aĉetis orajn artaĵojn kontraŭ 5 milionoj da zlotoj. Ekspozicion de trezorejo oni aranĝis vere moderne. El duonkrepusko lumo eltiras superbe brilantajn artaĵojn, kiuj rememorigas al spektantaro gravajn, grandiozajn kaj malpli grandiozajn momentojn de nia nacia historio.

Alia loko plena de interesaj, ankaŭ nemateriaj trezoroj estas Thesaurus Cracoviensis rigardebla en Muzeo de Krakovo ĉe Księża Józefa – strato 337. Tiun kontuaĵon eblas viziti nur kun gvidanto. Oni povas tie ekvidi aranĝitajn por publiko deponejojn kaj ankaŭ specialajn laborejojn. Interese estas ekvidi laborojn super krakovaj kripetoj. Nefacila kaj unika estas maniero renovigi kartonajn detalojn surgluitajn per staniolo kaj kaŭzi por ili transdaŭru ankoraŭ dum multaj jaroj.

Sidejo de Cento pri Arto de Tadeusz Kantor – Cricoteka ofertas varian ekspozicion sub titolo Personaj teatraj kostumoj de Kantor. Objektoj, kiujn oni povas rigardi estas ligitaj kun konkretaj personoj, aktoroj de Tadeusz Kantor – Teatro. La aktoroj uzadis ilin dum spektakloj. La ekspozicio – instalaĵo rememorigas multajn heroojn el dramoj de Kantor. Aŭtoro de ĝi Bogdan Renczyński – ankaŭ kantora aktoro de Cricot 2 preparis ĝin komencante de etoso de la teatra vestejo kun ĝustaj akcesoraĵoj, kiu en lumo de teatraj lampoj pretiĝas al spektaklo. Poste la instalaĵo malrapide, grade sin levas arigante objektojn kiuj apud aktoroj ankaŭ rolis en teatraĵoj. Inter kostumoj kaj aĵoj aperas grupo de infanoj – manekenoj el mondfama spektaklo La mortinta klaso.

Luis Masci, venezuela teatra kritikisto el Caracas, faris esencan klarigon de kantora Teatro de Morto, en kiu aktoroj kaj manekenoj rolas laŭ la samaj rajtoj. Spektakla manekeno – atestanto de ebla homo, kiun ni ne konas, ne rare fariĝas pli grava ol aktoro – signo, kiu nin kopias kaj samtempe povas dividiĝi de ni kaj funkcii montrante kaj ordigante nian percepton.

Manekenoj kaj aĵoj en spektakloj de Kantor gravas ne malpli ol aktoroj, kune kun ili formas la ĝustan etoson por esprimi intencojn kaj filozofion de la kreinto.

"Objektoj kaj kostumoj devas esti artaĵoj, kaj ne dekoraĵoj forĵetataj post uzo al balaaĵujo. Ili estas ecoj, kiuj faras Teatron Cricot 2 unika kaj pura arta aĵaĵo" – skribis Tadeusz Kantor.

Kostumoj de tiu instalaĵo estas pli konstruaĵo ol vesto. La finan efekton ili formas kiel moviĝanta skulptaĵo. Ju pli alte ĉi spektaklaj elementoj pendas, des pli ĉesas esti vestoj kaj ŝanĝiĝas en abstraktaj signoj, laŭ kiuj oni povas interpreti tutecan enhavon de la dramoj.

Nacia Muzeo en Krakovo prezentas ĝis 12. 03. 2023 j. pentroarton de Tamara Łempicka, artistino, kiun nunaj artkritikistoj opinias unu el la plej eksterordinaraj aĵaĵoj de la monda arto.

Sur preskaŭ 40 zorgeme elektitaj bildoj devenantaj el muzeoj kaj privataj kolektoj de Eŭropo kaj Usono oni povas observi ecojn de ŝia kreado dum unuopaj etapoj, inter dudekaj kaj sesdekaj jaroj de la XX jarcento.

Portretoj kaj aktoj prezentas stilon art déco – manierisman tendencon pentri fore de la klasika arto, per esprimo de la artista memo substrekante la novan ordon de la verko. Ili fariĝis simbolo de la epoka stilo.

El malpli konataj verkoj ni povas ekvidi bildojn pri temaro socie engaĝitaj, mutajn naturojn kaj komponaĵojn abstraktajn de kvindekaj jaroj ĝis plenaj de ekspresio bildoj pentritaj en jaroj sesdekaj kaj sepdekaj per spatelo.

La plej ofte Łempicka pentris artistojn, aristokratojn kaj reprezentantojn de la financa elito el Eŭropo kaj Usono. Pentraĵoj krom manierismo impresas spektanton pro la profunda observadsenso de la mondo kaj de la homo.

Pentroarto de Łempicka estas ligita kun ŝia maniero vivi, kion pruvas parto de ekspozicio. Zorgeme ŝi gardis la propran bildon, kiu montradis al la mondo virinon kaj artistinon subliman, laŭmodan kaj riĉan. Helpis al ŝi en ĉi tio filmoj kaj fotosesioj menditaj i.a. por gazetaro ĉe elstaraj fotografistoj de modo.